XXXIII ORDINARA TEMPO – 14-an de novembro 2010-a

PER VIA ĜISFINA PERSISTO VI SAVOS VIN MEM - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 21,5-19

En tiu tempo kelkaj parolis pri la beleco de la templo, pro la ŝtonoj ĝin ornamantaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj.

Tiam Jesuo diris: "Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas, estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono."

Tiam ili demandis Lin: "Majstro, kiam ĉi tio okazos? Kaj kiu estos la signo, ke ĉi tio alvenos?"

Jesuo respondis: "Estu singardaj, por ke oni ne trompu vin. Ĉar multaj sin prezentos en mia nomo, dirante: «Mi estas la Mesio!», aŭ: «La tempo alvenis.» Sed vi ne aŭskultu kaj ne sekvu ilin.

Kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne timu. Tiaj faktoj devas okazi antaŭe, sed tio ne signifas, ke tuj estos la fino."

Poste Jesuo diris al ili: "Leviĝos nacio kontraŭ nacio kaj regno kontraŭ regno. Estos ĉie grandaj tertremoj, malsato kaj pestoj, kaj grandaj signoj en la tero kaj en la ĉielo.

Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin; ili kondukos vin al siaj tribunaloj kaj al malliberejoj, trenante vin antaŭ reĝoj kaj regantoj, pro mia nomo.

Tiam vi atestos pri Mi.

Estu sentimaj! Ne zorgu pri via defendo: Mi mem donos al vi la ĝustajn vortojn kaj tian saĝon, ke viaj kontraŭuloj ne povos rezisti nek kontraŭdiri.

En tiu tempo vi estos perfidataj eĉ de gepatroj kaj fratoj, de parencoj kaj amikoj.

Kelkajn el vi oni mortigos. Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Sed eĉ ne unu haro de via kapo pereos. Per via ĝisfina persisto vi savos vin mem."

Por la kompreno de la ĉi-dimanĉa peco de la evangelio laŭ Luko, ĉapitro 21, versikloj de 5 ĝis 19, oni devas referenci al la historio de Izraelo kaj retroiri eĉ sep jarcentojn kiam Senaĥeribo, la terura reĝo de Asirio, post la disrabado de eĉ 46 urboj, sieĝis eĉ Jerusalemon. Nu, nokte, la lastan nokton, la nokton de la timo por la loĝantoj de Jerusalemo, kiam ili jam pensis ke la sekvan tagon venos por ili la fino, tiu nokto alportis grandan surprizon.

Matene ne plu estis la okupantoj, ne plu estis la invadantoj; Senaĥeribo malmuntis la tendaron. Tio estis interpretata en la II Libro de la Reĝoj, ĉapitro 19, versiklo 35, kiel agado de la anĝelo de la Sinjoro kiu frapis eĉ 185.000 soldatojn de Sennacherib. Tiu okazaĵo rezultigis la certecon, la esperon, ke en la momento de plej granda danĝero por Jerusalemo, Dio intervenos.

Kaj tio estis kantiaa en iu psalmo, psalmo 46, versiklo 6, kie estas dirite: "*Dio estas meze de ĝi, ĝi ne povos ŝanceliĝi*", do kiam Jerusalemo troviĝas en momento de plej granda danĝero, Dio intervenas. Tio komprenigas do la demandon de la aŭskultatoj, verŝajne disĉiploj, pri la agadoj de Jesuo, kiam – skribas la evangeliisto – "*kelkaj parolis pri la beleco de la templo, pro la ŝtonoj ĝin ornamantaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj".*

La templo de Jerusalemo, komencita de Herodo la granda, estis unu el la tiuepokaj mirindaĵoj, brilaĵo de riĉoj kaj luksoj. Ĝi estis unu el la plej belaj sanktejoj de la antikveco. Nu Jesuo anoncas ke "Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas, estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono."

Kaj estas tio kio fakte okazos per la sieĝado de la romianoj en 70-aj, kiam laŭvorte tiuj subfosos la murojn kiuj konsistigis la templon, kaj ilin disfaligos ĝis sube. Nu, antaŭ tiu ĉi anonco, la aŭskultantoj, la disĉiploj, ne nur ne ektimas, sed ŝajnas preskaŭ ekscititaj. "*Majstro, kiam ĉi tio okazos? Kaj kiu estos la signo, ke ĉi tio alvenos?"*

Jen, ili pensas kiel estis tradicio en Izraelo, ke en la momento de la plej alta danĝero Dio intervenos. Ili do esperas en dia interveno kiu malebligu tiun katastrofon. La reago de la aŭskultantoj ne esprimas timon, sed interesiĝon. Nu Jesuo, ordonmaniere, diras: "*Estu singardaj, por ke oni ne trompu vin. Ĉar multaj sin prezentos en mia nomo"* tio estas uzurpante lian person(ec)on, *"dirante: «Mi estas"* kio estas la dia nomo, depostulante do alporti la saman dian mesaĝon.

"*Aŭ: «La tempo…"* por "tempo" la evangeliisto uzas la vorton "kairos", kiu, male ol Kronos kiu indikas la tempon de la kalendaro, kairos signifas favoran tempon, oportunan tempon, okazon, ni povus traduki *"…la okazo alvenis.»* Jesuo estas tre klara "*Sed vi ne sekvu ilin".*

Jesuo invitas tute ne esperi je eksterordinara interveno fare de Dio, interveno kiu malebligu la katastrofon. Sed, asertas Jesuo, "*Kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne timu. Tiaj faktoj devas* " – tiu vorto indikas la dian volon - *okazi antaŭe,"* - *sed tio ne signifas, ke tuj estos la fino."*

Nome la inaŭguro de la Dia regno estas sinsekvo de liberigaj etapoj en la historio, sed la detruo de Jerusalemo kaj de ĝia templo, ne signifas ke tuj alvenas la komenco de la Dia regno. Ĝi estas unu el la etapoj kiuj pretigos la realigon de tiu regno en la historio. Kaj krome Jesuo, utiligante la tipan lingvaĵon de la profetoj per kiu ili antaŭanoncis la grandajn ŝanĝojn aŭ sociajn renversojn, li diras ke "*Leviĝos nacio kontraŭ nacio kaj regno kontraŭ regno. Estos ĉie grandaj tertremoj…"* , ili ĉiuj estas bildoj. Kion indikas la tertremo? Ĝi indikas la perforton kaj la rapidecon de invado.

"Malsato kaj pestoj," la neeviteblaj sekvoj de tiuj invadoj "*kaj grandaj signoj en la tero kaj en la ĉielo"* ne 'en la ĉielo' sed 'de la ĉielo', tio estas de la dia sfero. Kaj jen la anonco kiun Jesuo donas al tiuj ĉi disĉiploj, ekscititaj pro tiu perspektivo de dia interveno por la savo de Jerusalemo, kiun Jesuo malkonfirmas, "*Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin",* kaj Jesuo prezentas tri sanktajn valorojn – Dio, patrolando kaj familio – kiuj estas minacataj de Jesuo kaj de lia mesaĝo.

Ili estas la tri valoroj kiuj baziĝas sur la povo. La religia institucio, kiu utiligas Dion por regi la personojn, la nacio kie la reĝo kaj la potenculoj regas la personojn kaj la familio kie la viro estis la sendiskuta estro de siaj familianoj. Tiuj estas la tri medioj en kiu oni praktikas la povon, unu sin ŝirmas kaj sin defendas per helpo de la alia, kiuj sin vidas minacataj per tiu servo-amo proponata de Jesuo.

Tiam, diras Jesuo: "*Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin; ili kondukos vin al siaj tribunaloj kaj al malliberejoj,"* do persekutado pro religiaj kialoj, "*trenante vin antaŭ reĝoj kaj regantoj,"* persekutato pro civilaj kialoj, kaj ĉio tio "*pro mia nomo"* pro la aliĝo al Jesuo kaj al lia mesaĝo.

Sed ĉio tio estos okazo por doni ateston kaj oni vidos ke tiuj defendantoj de tiuj sanktaj valoroj estas, reale, la malamikoj de la homoj. Jen kial Jesuo, en Dio, patrolando kaj familio, proponos anstataŭigi Dion, komunan nomon en ĉiuj religioj, per Patro. Dum en nomo de Dio oni povas forpreni la vivon al la personoj, en la nomo de la Patro oni povas nur doni la propran. Patrolandon Jesuo anstataŭigos per la regno de Dio, ne limoj sed universala amo. Kaj la familio de Jesuo ne estos tiu markita per la sangligiloj, sed per la kundivido de iu idealo, la amo.

Kaj do tiu persekutado kiu furioziĝas, pruvos ke la defendantoj de tiuj falsaj valoroj estas malamikoj de la homaro. Kaj Jesuo anoncas: "*Ne zorgu pri via defendo: Mi mem donos al vi la ĝustajn vortojn kaj saĝon"* , ĉar, kiam oni vivas en agordo kun Jesuo por la bono de la homo, oni vivas lian saman vivon, oni absorbas lian saman lingvaĵon, tion kio disradias de la vivo de kredanto.

"Ke viaj kontraŭuloj ne povos rezisti nek kontraŭdiri". La evangeliisto utiligas vortojn kiujn li poste utiligos en la dua parto de tiu evangelio, en la Agoj de la Apostoloj, por la anonco de la unua kristana martiro, Sankta Stefano, kies malamikoj povis nek rezisti nek kontraŭbatali liajn asertojn kaj Stefano estos akuzata esti parolinta kontraŭ la templo kaj kontraŭ la leĝo. Tiu kiu tuŝas tiujn sanktajn valorojn, mortas.

Do la universala mesaĝo de la regno de Dio, kiu nuligas la privilegion de Izraelo, ĝia revo je regado, je supereco, eksplodigas teruran reagon kontraŭ la sekvantoj de Jesuo, tiomgrade ke, konkludas Jesuo "*En tiu tempo vi estos perfidataj eĉ de gepatroj kaj fratoj, de parencoj kaj amikoj kaj kelkajn el vi oni mortigos".* La evangeliisto ĉi tie referencas al leĝo entenata en la libro de Readmono, ĉapitro 13, kie, en kazo de idolkulto, oni estas rajtigataj, eĉ benataj, mortigi eĉ siajn familianojn. La aniĝo al Jesuo signifos, antaŭ la okuloj de la Izraela socio, tioman renverson de valoroj, krimon tiom grandan ke oni ĝin komparas al idolkultado, kiu sukcesas nuligi eĉ la plej striktajn familiajn ligojn.

Do la aniĝo al la mesaĝo de Jesuo estas konsiderata kiel idolkultado, kaj pro tio oni povas mortigi personon, eĉ propran familianon. Kaj jen la certigo de Jesuo – ĉio tio ne estas mesaĝo de angoro sed de espero, antaŭ la neeviteblaj persekutoj kiujn vivi kun Jesuo kaj kiel Jesuo implicos por la vivo de la komunumo de kredantoj, "*Sed eĉ ne unu haro de via kapo "* la haro estas la minimuma parto kiun iu persono havas surkape, " p*ereos"* ĉar, konkludas Jesuo, "*Per via ĝisfina persisto"* per via fideleco al tiu mesaĝo de la bona novaĵo, " *vi savos vin mem".*

La vorto utiligata por vivo estas psyché, kiu indikas veran vivon, tiu kapabla rezisti al morto. Ankaŭ se estos persekutadoj, ankaŭ se oni foprenos al vi la fizikan vivon, via vivo, tiu vera, la profunda realo, tiu daŭros porĉiame.

Ke ne temas pri mesaĝo de timo, de angoro, sed de espero videblas krome daŭrigante la pecon ĉe versiklo 28, kiam Jesuo diras: "Kaj kiam komencos okazi tiuj aferoj leviĝu kaj levu la kapon, ĉar via libero estas proksima". Do ĉiuj tiuj persekutadoj, ĉiu tiu malbono kiu turniĝas kontraŭ vi estas denunco ke tiuj kiuj tion faras estas malamikoj de la homaro kaj estas konfirmo ke vi estas, kun Jesuo, por la homoj.